001.4 = 089.2 : 061.22 (ISAE).04
*E 28 : 5(06) ISAE*

# DU RAPORTOJ DE LA TERMINOLOGIA CENTRO DE ISAE

**Pri la laboro de la Terminologia Centro.** — Depost kiam la subskribinta direktoro de la *Terminologia Sekcio* eksiĝis el sia posteno de *Delegito de ISAE por Germanujo* (li transdonis ĝin al d-ro V. Happach), li estas sufiĉe libera por la multspecaj taskoj de terminologia laboro en *ISAE, Akademio* kaj por *PIV*. Pluaj kontribuaĵoj de diversaj fakaj kompetentuloj nun estas envicigitaj en la Centran Sliparon, kiu jam ofte kapablis funkcii kiel konsultoverko por demandintoj. Tiel la sliparo jam nun estas bazo, certe ankoraŭ ne kompleta, tiel de la estiĝanta *PIV* (kiu estos vulgariga verko), kiel de estontaj fakvortaroj specialaj. Tiuj terminoj kiuj evidente estas ekster la kadro de la *vulgariga PIV*, estas registrataj en speciala sliparo ordigita laŭ fakoj. — Dum la lastaj monatoj ankaŭ ekiĝis la preparoj por havigi al ni la *ilustraĵojn* necesajn por PIV. Unue la bildstrioj de la germana verko *„Der Sprach-Brockhaus"* liveris la bazon por tio. Kelkaj malfacilaĵoj ankoraŭ ekzistas rilate la ilustradon, ĉar ne por ĉiuj fakoj troviĝis kunlaborantoj-fakestroj, ekz-e ne por *ŝipoteknik̂o* kaj *militista tekniko*. Temas pri tio, ke la fakestroj kontrolu la prezentitajn bildojn de *„Brockhaus"* rilate alprenon por PIV, ĉar la nombro de la bildoj devas esti limigata. — En kunlaboro kun la *Akademio* kaj la *ĉefredaktanto de PIV* la *Terminologia Centro* sekvis certan planon pri la alpreno de neologismoj por novaj teknikaj kaj sciencaj nocioj. — La subskribinto tre bedaŭras ke *ISAE* ĉiam denove ne disponas regule aperantan organon en kiu estus eble senprokraste diskuti kurantajn demandojn sur terminologia kampo.

677(075) = 089.2

**Esperantlingva fakliteraturo.** — Kelkfoje esperantistoj-verkistoj konsultas la *Terminologian Centron* pri terminoj kiujn ili intencas uzi en siaj originalaj verkaĵoj aŭ tradukoj. Estas nepre dezirinde ke tiu Centro estu informata pri proponindaj, sed ankoraŭ ne uzitaj neologismoj, por ke ĝi povu antaŭhaltigi misuzon.

Ĝenerale abundas plendoj, ke niaj esperantistoj-fakuloj tro malofte uzas Esperanton por publikigi siajn spertojn aŭ esplorojn. Sen teknika verkaro ni ne povas fari Esperanton tiel valora por praktika vivo, kiel estas la lingvoj naciaj. Poezio kaj beletro faras multon, tamen sen teknika literaturo tio similas antaŭenŝovadon de nur unu kruro, kiam homo klopodas iri antaŭen! — Tial la subskribinto precipe ŝatas ke unu el la membroj de TS estas pliriĉiganta la esperantlingvan fakliteraturon per grava verkaĵo, nome S-ino Marie Bartovská, Brůzovská 330, Mistek, ĈSR, kiu preparas *Lernolibron pri Teksindustrio.*



Ŝajnas al mi ke ĉi tiu lernolibro estas ne propre originala verko en Esperanto, sed plejparte traduko kompilita el ekzistantaj lernolibroj germanaj kaj ĉeĥaj; tamen tiu teknika verkaro meritas justan atenton. Mi korektolegis la unuan ĉapitron kaj devas laŭdi la lingvokapablon de la verkintino.

Tial TS de ISAE deziras al la verko baldaŭan publikigon.

R. Haferkorn.

001.4 = 089.2 : 061.22 (ISAE).04
*E 28 : 5(06) ISAE*

## INFORMO

de: TERMINOLOGIA CENTRO (ISAE/PIV)
dipl. inĝ. R. Haferkorn
Königsseer Str. 50, (13b) Berchtesgaden, Germanujo

**al: ĉiuj fakvortaristoj!**

## LA FAKVORTARA PROBLEMO

Estas fakto ĝojiga por la Esperantomovado, ke multaj asocioj de esperantistoj-fakuloj klopodas krei fakan literaturon en la Internacia Lingvo, kaj ke ili ekpreparas specialan vortaron pri sia propra fako. Esperantaj fakvortaroj devas baziĝi antaŭ ĉio sur la jam aperintaj terminaroj internaciaj, eldonitaj de internaciaj fakorganizaĵoj. Tiel faras la arkitektoj, elektroteknikistoj, fervojistoj, geodeziistoj (inkluzive de geometroj kaj topografiistoj), geografoj, grafikistoj, juristoj, kuracistoj, konstruinĝenieroj, meteorologoj, ktp. Evidentiĝas ke ĉi tiuj fakoj kaj iliaj terminologioj parte koincidas unu kun alia, precipe rilate siajn helpsciencojn. El tio rezultas la neceso kunigi la individuajn fakterminologiojn en komunan sistemon. Ĉi tiun celon ni atingos, se ĉiu fakgrupo unue interrilatas kun la *Terminologia Centro,* antaŭ ol ĝi definitive ellaboras fakvortaron. Tiu Centro unue estis reprezentata sole de la gvidanto de la *Terminologia Sekcio de ISAE,* poste ĝi estis ligata kun la redaktado de la *teknika-scienca parto* de la *Waringhien'a Plena Ilustrita Vortaro (P.I.V.).* Tiu Centro sekvas la principojn pri vortfarado preskribitajn de la *Akademio de Esperanto.* Interrilatante kun la Terminologia Centro, la verkistoj de fakvortaroj atingas unuformecon de la teknika lingvo, do helpos konservi la simplecon kaj la puran karakteron de Esperanto, evitante superfluajn neologismojn. La Centra Sliparo kiu dum la lastaj jaroj estiĝis por havigi al ni tute fidindan bazon por la nova eldono de *P.V.* - do por la *P.I.V.* -, jam hodiaŭ grandskale povas servi kiel konsultoverko por fakvortaristoj, ĉar ĝi ampleksas ankaŭ la enhavon de S.T.T., evitante la erarojn tie ankoraŭ troviĝantajn.

P.I.V. ja celas esti tute fidinda bazo por poste verkota pli specialigita fakvortaro; pro tio ni ja rekomendas al la fakvortaristoj atendi la aperon de PIV antaŭ ol publikigi novajn terminarojn.